

POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE.

ROK XXI. JARO.

KRAKÓW
GRUDZIEŃ 1927 DECEMBRO

Nr. 12. N-o

N A S Z B I L A N S R O C Z N Y .



DY w roku zeszłym przenieśliśmy redakcję Polskiego Esperantysty do Krakowa, nie uśmiechały nam się horoskopy. Przenieść pismo trzeba było dlatego choćby, ażeby ująć pracy jednemu człowiekowi, który robił, co mógł, ażeby podtrzymać jedyny w Polsce organ esperantystów polskich. Cześć zasłudze prawdziwej i pracy iście obywatelskiej naszego, zawsze nam miłego Samideano Stanisława Karolczyka, bo bez tej Jego ofiary z czasu i monety dziś musielibyśmy stwarzać na nowo to, co przez lat kilkanaście znaczyło naszą pracę na niwie języka pomocniczego. Dzisiaj warunki mocno się zmieniły na naszą korzyść, gdyż coraz bardziej, acz powoli rozwija się poczucie potrzeby przyjęcia języka esperanto do stosunków pomiędzy ludami całego świata. Ilość abonentów pisma wzrosła prawie w trójnasób, teka redakcyjna nigdy nie jest pusta — możemy nawet być wybredni i wybierać artykuły odpowiedniejsze do potrzeb chwili, zostawiając inne na czas właściwszy. Z góry też przepraszamy tych naszych szanownych współpracowników, którzy może za długo czekają na pojawienie się swojej pracy i już zaczynają tracić cierpliwość.

Słyszeliśmy niejednokrotnie zarzuty, że pismo nasze jest zbyt luksusowo wydawane pod względem zewnętrznym. Możliwe wydawać pismo bez okładki, na tańszym papierze, na wzór praktyczniejszych pod tym względem naszych sąsiadów, w dodatku nawet od nas zamożniejszych, ale tu na przeszkodzie stoi tradycja. Pola Esperantisto zawsze wychodził z okładką i wyglądał estetycznie. I co do treści dałoby się może nie jedno zarzucić, zwłaszcza to, że tej treści za mało. Dążeniem naszym będzie o ile można brakowi temu zapobiec, ale to zależy już prawie jedynie od ilości naszych abonentów: gdy tylko ilość ich tak wzrośnie, że przestaniemy się oglądać za każdym groszem i pokrywać zaczniemy nakład pisma bez deficytu, którego wprawdzie nie mamy, ale który nam ciągle zagraża, wówczas posta-

ramy się zrazu o dodatki co pewien czas, potem o stałe powiększenie objętości pisma. I dlatego zwracamy się teraz z prośbą do przyjaciół pisma o wyszukiwanie czytelników, abonentów. Gdyby każdy z dotychczasowych abonentów zdołał zjednać tylko jednego, jużbyśmy wyszli z pod groźby deficytu i nawet mogli rozszerzyć ramy pisma. Dodać należy, że bezustannie otrzymujemy wiadomości o dokonanych już tłumaczeniach wybitnych polskich pisarzy, z którymi trzeba by zapoznać ogół czytający poza Polską zapomocą tłumaczeń na Esperanto. Mamy przetłumaczonego Irydjona Kraśnińskiego, mamy Quo vadis, mamy wiele innych pięknych rzeczy, niestety wszystko to czekać musi na ujście światła dziennego, którego bez monety dać nie można. To też, jak mówimy, każdy, komu zależy na rozszerzeniu pisma niech postara się choćby o jednego czytającego esperantystę, odrazu dodamy, regularnie płacącego wkładkę kwartalną. W początkach musimy oglądać się również na pomoc członków wspierających, bez których jeszcze teraz nie potrafilibyśmy pracować. Dlatego prosimy również o oświadczenie gotowości płacenia pewnej miesięcznej wkładki jako zapomogi za czytelników dosyć licznie zgłaszających się do redakcji o przesyłanie pisma bezpłatnie, bo ich na razie nie stać na abonament. Nie możemy niestety zadosyć uczynić wszystkim żądającym, bo na to nasze środki nie pozwalają. Rok ubiegły zamykamy pod dobrą wróżbą: rozszerza się koło chcących poznać język esperanto, w licznych miastach powstają nowe grupy esperantystów; w Warszawie, Poznaniu, Lwowie, Krakowie garnie się do esperanta młodzież wyższych uczelni, coraz częściej słysząc głosy profesorów i nauczycieli szkół powszechnych, średnich i wyższych — wchodzimy wyraźnie w nowy okres znacznie różniący się od lat ubiegłych, okres dużo silniejszego ruchu na polu działalności esperanta. O. B.

LA SKRIBMAŜINO DE MIA PATRO.

Ĝi staris sur kverka tableto apud fenestro en nia mangoĉambro. Vespere ĝi estis alŝovata al la lumo de l' supertabla lampo. Tage ĝi laboradis nur dum kelkaj horoj, sed ĝia vera vivo komenciĝadis vespere. La frapbruado de ĝiaj etaj klavoj estis por mi kvazaŭ lulkanto; io mankis al mi kaj la dormo forkuris dum maloftaj vesperoj, kiam ĝi staris silenta.

Ĝi estis mia bona, honesta amiko. Mi alkitimiĝis al ĝia unutona melodio, en kiu la frapadon de l' klavoj interrompatis bela sonoro, anoncanta finiĝon de la linio, kaj grinco de la tirilo; ĝian lignan kovrilon miaj pupoj ĉiam opiniis tre oportuna veturilo.

Mi preskaŭ ne memoras la tempon, en kiu ĝi ekokupis la lokon en nia domo. Fluus jaroj — ĝi ĉiam laboradis senlace, estante ne nur maŝino,

sed preskaŭ amiko de mia patro. Amiko neniam senpacienĝanta, neniam malesperanta, sed ĉiam fidela, ĉiam esperiga.

Komence mi estimis ĝin, kiel aĝan, seriozan amikon de la familio. Poste mia rilato fariĝis pli intima. Mi stariĝadis apude kaj kun intereso rigardis la laboradon de ĝia meĥanismo. Fine mi kuraĝis sidiĝi sur tabureto kaj ekfrapi la klavojn, ĝojante, ke la literoj estis multe pli belaj ol tiuj, kiujn skribis en kajero mia mallerta mano. Sed mia unua vera ĝojo estis, kiam mi maŝinskribis ekzercon kaj fiere montris ĝin al mia instruistino. Mi estas certa, ke nur tial ŝi ne tre admonis min pro eraroj, kiuj en alia okazo kaŭzus ŝian severan mallaŭdon.

Mi kreskis, pasadis de pupoj al fabeloj, de fabeloj al ĉiam pli realaj rakontoj, ĝi — la maŝino — senĉese laborante, rakontadis per sia unu-
tona voĉo ĉiam la saman historion.

Dum unu vintra vespero, kiam post pacienca, sepjara laborado mia patro finis ian gravan verkon, en nia loĝejo bruis gajaj ridoj, gratuloj, babiloj. La maŝino staris trankvile, silente en sia anguleto. Kaj en mian infanan cerbon venis la penso, ke se mi estus la maŝino, mi sentus min ofendita pro tiu forgeso dum tiu solena vespero, kiun mi ja helpis alproksimigi. Sed la senviva maŝino estis pli alta, ol homaj koleroj kaj ĵaluzoj, kaj jam la sekvintan tagon ĝi kantis per sia kutima melodio novan kanton de laboro.

Tiel ĝi senlace laboradis dum multaj jaroj — sed pasis la feliĉa tempo. Ĉiam pli ofte ĝi staris silenta, ripozanta kontraŭ sia volo kaj kontraŭ la volo de l' homo, kies koron dolorigis la okazintaĵoj de l' ekstera mondo.

Venis la momento, ke rigidigis la fingroj, kiuj movigadis ĝiajn etajn klavojn... Ĝi staris en sia anguleto, kovrita per nigra kovrilo. Ĝi staris trankvila, indiferenta, nenion sentanta — la maŝino.

Monatoj pasadis. Sur la kverka tableto la maŝino staris — fermita. Longe mi hezitis, antaŭ ol mi kuraĝis levi denove la kovrilon. Kaj ŝajnis al mi tiam, ke mi levas kovrilon de l' ĉerko...

Mi ekfrapis — resonis la klavoj. Malrapide, malkuraĝe, kvazaŭ kun miro, kiel homo, kiu vekigis post longa dormo kaj demandas, kie li estas, kiuj estas tiuj, kiuj lin ĉirkaŭas. Kaj ĝiaj senvortaj sonoj ŝajnis vortoj de konsento, eble la plej kortuŝaj...

Dek jaroj pasis. La malnova maŝino staras sur sia tableto. Kompare kun la lastaj sistemoj ĝi ne prezentas grandan valoron. Mankas kelkaj gravaj aranĝoj kaj stenotipistoj rigardas ĝin komplete, preskaŭ malestime. Mi tamen respektas ĝin. Kaj kiam mi deprenas la kovrilon, kvazaŭ ridetas la amika vizaĝo kaj antaŭ la okuloj hele brilas la surskribo, ĉizita sur la maŝino: »Ni laboru kaj esperu«.

N E M A L U T I L U !

Malagrablan sed gravan okazintaĵon necesas tuŝi. Feliĉe jam pasis 20 jaroj de la momento, kiam unu el talentaj kaj tre agemaj esperantistoj, Sro de Beaufront trovis, ke Esperanto estas plibonigebla kaj devas fariĝi pli proksima al la naturaj eŭropaj lingvoj.

Sro Beaufront, ekveniinte gloron kaj meriton al Zamenhof, volis fariĝi mem lia mondfama korektisto, pliboniginto kaj en maniero tute malinda li kaŝe kaj perfide subŝovis siatempe Idon anstataŭ Esperanton.

Tiam ĉi lia ago faris grandan bruon en Esperantujo, la publika opinio plene malaprobis kondutmanieron de Sro B., kaj esperantista vivo eliminis lin el siaj vicoj kun malhonoriga stampo de perfidulo.

Kvankam esperanta kverko jam tiam sin montris sufiĉe forta kontraŭ embuska atako de Sro B., tamen tia ago multe malutilis al trankvila kaj pli rapida evoluo de Esperanto, ĉar ekstera publiko jam ekŝanceliĝis kaj ekmalfidis certecon kaj nevenkeblecon de Esperanto, aŭdante ke ĝi havas novan kaj »pli bonan« konkuranton, nome Ido. Tamen post brua ago de Beaufront revenis trankvilo kaj tiel pasis multaj jaroj; bedaŭrinde en lastaj tempoj denove oni senbezone altrudas novajn sufiksojn, ofte nenecesajn radikojn kaj lingvajn formojn. La esperantista popolo protestas kontraŭ tio, sed aŭtoroj kaj redaktoroj en kelkaj gazetoj malatentas tion kaj nepre nin volas feliĉigi per »plibonigoj«.

Plibonigistoj estas konscie aŭ eĉ nekonscie forte ambiciemaj kaj volas influu la evoluon de la mondlingvo laŭ sia persona plaĉo. Ilin postsekvas areto da simpluloj, kiuj senkritike kaj volonte kaptas ĉiun novaĵon. Plibonigistoj estas inteligentaj kaj lingvospertaj, sed bedaŭrinde tro malpaciencaj nesufiĉe saĝaj kaj tro malmulte ili subigas propran »mi« al granda »ĝi« por kompreni kaj senti, ke Esperanto disvolviĝos mem sur normala vojo sen ekstera helpo. Efektive iafoje nin renkontas lingvaj malfacilaĵoj sur kampo de Esperanto, sed ili estas sendube solveblaj per profunda studo kaj prilaboro de Esperanto mem.

Inter tiuj plibonigistoj ŝajne troviĝas Sro Teo Jung, redaktoro de *Heroldo de Esperanto*. Ni diras ŝajne, ĉar ĝis nun konkrete Sro T. Jung nenion faris kontraŭ nia lingvo. Sed liaj lastaj artikoloj sub titolo »Ni kaj aliaj« kvazaŭ intencas prepari grundon, al kutimigi legantaron kaj prepari ilin al tolerema traktado de »plibonigoj«.

Jam de kelka tempo estis rimarkebla speciala intereso de Sro T. J. pri diversaj projektoj de lingvo internacia, sed lastaj okazintaĵoj jam vekis kontraŭstaron de multaj esperantistoj, kaj tial necesas averti Sron Teo Jung, ke, dum li estas eldonanto kaj redaktoro de *Heroldo de Esperanto*, li devas resti fidela ne sole al *ideo* de lingvo internacia, sed al la lingvo

Esperanto mem, ĉar ĵa legantaro nur tial restas fidela al lia presorgano, ĉar ĝi opinias, ke tiu gazeto efektive *heroldas Esperanton*. Ne estas konvene kaj dece subfosi idean certecon kaj konvinkitecon de esperantistaro kaj subŝovi al atento diversajn konkurantojn kaj des pli konsili »fari jam nun pacan interkonsenton« kun ili. Fundamente eraras Sro T. J. dirante, ke »nia ideo jam estas neekstermebla, ĝi jam restados por eterne« »kvankam la formo estas pasema«, ĉar se, uzitan de li vorton »nia«, oni devas kompreni »de esperantistaro«, do ilia ideo estas tiel intime kaj tiel forte ligita kun formo de Esperanto, kiel vivo de semo estas ligita kun ĝi mem kaj ĝia floro. Se pereus *nia* formo, pereus *nia* ideo! Tio ne malhelpus, ke pluen vivu aliaj ideoj, ligitaj kun aliaj formoj, eble eĉ parencaj aŭ similaj, tamen ne la samaj kaj ne la »niaj« laŭ nuna vidpunkto. Ideo sen formo ne povas ekzisti. Ĉiu aparta ideo estas individue ligita kun sia propra formo. Ofte formoj pereas, sed ankoraŭ pli ofte naskiĝas novaj ideoj en novaj formoj. Ni esperantistoj estas konvinkitaj kaj certaj, ke nia »formo-ideo« estas plene taŭga por nun kaj por longe estonte por tuta homaro. En tiu certeco kaj konvinkiteco kuŝas nia profunda forto kaj ni kuraĝe kaj publike konstatas, ke ĉiujn eventualajn barojn kaj malfacilaĵojn ĉu lingvajn ĉu sociajn ni venkos sendube tute sen ia ajn helpo flanke de Ido, Ro, Interlingua, Occidental, Medial ĉu aliaj projektoj. Ni nur restu fidelaj, ni nur laboru por nia »formo-ideo«, ni fosu nian sulkon kaj venko plene venos. Al nia movado plej malutilas manko de sento pri memstareco, manko de forta konvinko pri plena sufiĉeco kaj sufiĉa perfekteco de nia lingvo kaj fine emo al serĉado de ŝanĝetoj, falsaj »plibonigoj« kaj troa imitado de detaloj kaj karakterizaĵoj de aliaj lingvoj. Ni ne forgesu, ke multaj naturaj lingvoj estas neperfektaj, iafoje eĉ pezaj, malfacilaj, nekonvenaj al diversaj branĉoj de la scienco, ĉu de la tekniko, ke ofte al ili mankas terminaro propra por diversaj fakoj, kaj malgraŭ tio neniu kuraĝas reformi la lingvon, neniu ĝin laŭ propra gusto »plibonigas«, nek iu ajn proponas, ke ekz. pola aŭ sveda lingvo »kunsidu kun la aliaj kaj faru kontrakton« aŭ ke poloj aŭ svedoj »sincere kunlaboru, kun alilingvanoj, por la teoria plibonigo de sia lingvo«. Same estas forĵetinda tia projekto rilate Esperanton.

Ankaŭ tute malĝusta estas ideo de Sro Teo Jung ke lingvo internacia destinita estas servi al la tuta mondo, do ankaŭ al la homoj de koloraj rasoj. Dume »plibonigoj« kaj »pliperfektigoj« de lingvo internacia por eŭropanoj, kiuj konas ĉefajn eŭropajn lingvojn, ofte estas tre interesa, incitanta kaj facila mensokupo, kontraŭe estas por ne-eŭropanoj, kies vorttrezoro estas tute alia ol tiu de Eŭropo, kaj al kiuj eĉ malgrandaj lingvaj ŝanĝoj estas nova problemo por parkerado kaj por ili estas tute indiferente, ĉu iu ajn »projekto estas pli proksima al la naturaj eŭropaj lingvoj« ĉu ne, kaj ili estas

naturaj malamikoj de ŝanĝoj en lingvo internacia, kiu jam sen tio por ili estas fremda kaj ne tre facila.

Sekve la projektoj kaj konsiloj de Sro Teo Jung ne kondukas al plibonigo sed kontraŭe al ruinigo de Esperanto. Tion bone pripensinte, li sendube ĉesigos ilin, rememorante la historion de Sro de Beaufront.

Dro Jan Mędrkiewicz.

OTTO FLATAUER.

AL VI, NIA MAJSTRO!

*Deklamis ĉe la Tombo de l' Majstro
dum la postkongreso en Warszawa
Sino Herrstadt-Oettingen,
artistino de Berlina teatro.*

*Al Vi, nia Majstro, nun ĉie sur tero
Miloble sonegas la himno „Espero“
Al Vi, kies penso kaj koro kaj faro
Akcelis fratiĝon de l' tuta homaro
Ni kor-ovacias.*

*Al Vi ni venas nur kun la dolĉkanto
Kaj kun paroladoj deklamaj
Ni ne demonstradas nun por Esperanto
Per vortoj nur fortaj, hel-flamaj*

*Al Vi ni nun juras per amo pasia
Ni ĉiam batalos, laboros,
Ĝis por Esperanto, la internacia
Helplingvo — la venko ekfloros!*

*Ni marŝu antaŭen sen ia malkaŝo
Kuraĝe kaj forte nur — paŝon post paŝo
Al celo senhalte, esperon en koro
Al Majstro je gloro!*

DISKUTA VESPERO EN LA VARŜAVA UNIVERSITATO.

Pola Studenta Esperantista Societo-Warszawa komencis agi sur la kampo de la altlernejoj en Warszawa. Dank' al helpo de ĝia honora prezidanto prof. Dr. Odo Bujwid oni ricevis permeson de la tre favora por Esperanto rektoro prof. pastro Szlagowski aranĝi en la Universitato diskutatan vesperon. La Societo komencis tuj viglan propagandon en ĉiuj Varŝavaj altlernejoj per disdono de 20.000 diversaj flugfolioj kaj du murafiŝoj. Ekinteresiĝo en kelkaj lernejoj estis tre granda.

La 30 XI. de kuranta jaro ĉirkaŭ 350 studentoj kunvenis en salono de prof. Wł. Smoleński por aŭskulti la anoncitajn prelegojn.

La kunvenon malfermas en la nomo de Pola Studenta Esperantista Societo s-ro Jan Pudel. Antaŭ la tagordo li anoncas, ke en januaro 1928 j. estas *komencotaj prelegoj de prof. Bujwid pri artefaritaj lingvoj kaj Esperanto*. Sekve li petas la honoran prezidanton de la Societo prof. Bujwid prezidi la kunvenon kaj, kiel asesorojn s-ron red. Leo Belmont kaj reprezentantojn de ĉiuj varŝavaj altlernejoj. La elekton oni aprobas per varmaj kaj neĉesiĝantaj aplaŭdoj.

La prezidanto en antaŭparolo faras interesan prelegon pri lastaj sukcesoj de la Esperanto-afero. Specialan ekinteresiĝon kaŭzis bele eldonita gvidlibro tra Japanujo, kiun la profesoro montras al la aŭskultantaro.

Post la antaŭparolo prenas la parolon s-ro Leopold Kronenberg, prelegante pri neceso de la lingvo internacia kaj pri avantaĝoj de Esperanto.

Sekve levigas red. Leo Belmont. Jam la nomo sufiĉas. Bruaj aplaŭdoj ne permesas al li komenci sian paroladan. Pravaj argumentoj, miksitaj kun multe da humoro kaŭzas denove aplaŭdon.

Post la prelegoj la prezidanto malfermas diskutadon, kiu pro malfrua horo ne daŭras longe kaj havis informan karakteron.

Sekve oni akceptas rezoluciojn: 1) laŭ propono de s-ino Stanisława Śmiełowska peti senaton de la Universitato aranĝi konstantan lektoraton de artefaritaj lingvoj kaj Esperanto, 2) laŭ propono de s-ro Wiktor Ociepkó (stud. de Lernejo de Politikaj Sciencoj) peti direktoron de Pola Radio organizi konstantajn prelegojn kaj lekciojn de Esperanto per radio, 3) laŭ propono de s-ro Mieczysław Trochimowski (stud. de Politekniko) peti Ministraron de Publika Klerigado enkonduki Esperanton en ĉiujn lernejojn de la Respubliko kaj precipe en ĉiujn altlernejojn.

La proponoj estas denove brue akceptitaj. Malgraŭ tio la prezidanto demandas, kiu estas kontraŭ la proponoj. Neniu.

Tiel favore kaj tre fervore rilatas la universitata junularo al la Esperanto-afero kaj malgraŭ tio la senatoj estis ĝis nun surdaj. La unuan paŝon en tiu direkto faras la Universitato dank' al penoj de prof. Bujwid kaj favoro de rektoro Szlagowski. Ĉar la Pola Studenta Esperantista Societo intencas aranĝi similajn vesperojn en aliaj altlernejoj, ni esperu, ke la afero sur tiu kampo marŝos pli bone ol ĝis nun.

Dum la kunveno oni disdonis pollingvajn broŝurojn de M. Trochimowski, numerojn de »La Movado« kun franclingvaj opinioj de diversaj eminentuloj kaj aliajn propagandilojn.

KOMUNIKOJ DE P. E. D.

Bedaŭrinde la redakcio ĝis nun ne ricevis la regularon de PED. aprobita dum la konferenco en Warszawa la 6 de oktobro. Ĉu Lublina poŝto kulpas?

Unua konferenco de esperantistoj de Krakowa vojvodio okazis la 13-an de okt. k. j. en Kraków, kunvokita de la subskribita estraro. Ĉiuj Krakovaj gazetoj longe raportis.

Bedaŭrinde partoprenis nur Kraków, Brzesko, Wadowice, Wieliczka kaj Zabierzów, kiuj ne povis surpreni jam nun formi laŭ la statuto de PED *vojvodian distriktestraron* de PED. Sed elektiĝis komisiono celanta organizi la distriktestraron: prof. Biliński, prof. Płonka, Dr. Rosentalowa.

Por ke nova konferenco estu kompleta, grupoj de ĉiuj urboj kaj izoluloj de ĉiuj lokoj anoncu baldaŭ al ni («Societo Esperanto», Kraków, Smoleńska 9) pri sia ekzisto kaj pri aliĝo al la afero, tiel ke nova konferenco okazonta post nelonge en Kraków celanta la organizon, estu kompleta. La daton ni fiksos en »Pola Esp.« kaj aparte sciigos ĉion necesan al tiuj, kiuj estos sin anoncintaj.

La estraro de Societo Esperanto.

SOCIETA VIVO.

Esperanta grupo Będzin sciigas, ke nuntempe la movado evidente kreskas. Oni organizis Esperantan Rondon kaj elektis, srojn Sercarz, kiel prezidanton, vicprezidanton Kozłowski kaj sekretarion Rozen. Estas organizita kurso, al kiu apartenas 70 anoj. La estraro organizis prelegon kaj propagandvesperon por la librofesto. Nia redakcio sendas al fervoraj samideanoj koregajn bondezirojn.

Bielsk Podlaski. Vojev. Białystok. Samideanoj Sudlitz kaj Witkowski enkondukis esperanton ĉe la tiea Popola Universitato: jam partoprenis 80 lernantoj. Nia redakcio volonte sendos kelkajn esperantajn gazetojn kaj eble libretojn por subteni tiel valoran agadon. Sed ni konsilas, ke niaj karaj samideanoj kolektu malgrandan sumeton por povi aĉeti librojn kaj laueble aranĝi propran bibliotekon. Kalkuli je propraj fortoj estas plej valora kaj certa afero.

Lwów. En la Universitato dank al la afabla permeso de la rektoro pastro Sro Prof. Dro Gerstman komenciĝis kurso de Esperanto por la studentoj de ĉiuj fakultatoj en la belega salono de la fiziologikemia instituto. Partoprenas 22 lernantoj. Kurson gvidas sro S. Zausmer, de longe konata fervora samideano. Bonegajn sukcesojn!

Societo Esperanto en Kraków sciigas, ke deĵoroj okazigas ĉiulunde en Muzeum Przemysłowe, strato Smoleńska 9 II p. ĉambro 133.

Studenta Esperantista Rondo (Akad. Koło Esperantystów) en Kraków aranĝis solenan inauguracion la 11 XI. Ĉeestis ĉirkaŭ 150 personoj. Prof. de tiuloka universitato S-o P-o Dro Witold Wilkosz, kuratoro de la Rondo, aŭdigis tre interesan prelegon je temo: »Signifo de la internacia lingvo por scienco«.

Dank' al klopodoj de la sama rondo okazis la 24 XI. publika prelego je temo: »Sekretoj de la vivo de blinduloj«. Prelegis esperante s-o A.

Cohen, blinda Anglo, kiu vojaĝas tra Eŭropo. Tradukis s-o Ziomek. Ĉeestis pli ol 120 personoj, kvankam enirbiletoj estis sufiĉe multekostaj. Adreso de supre nomita Rondo: Kraków, Wincentego Pola 5.

Zawodowy Związek Kolejarzy (Profesia Ligo de Fervojistoj) aranĝis kurson por siaj membroj. Enskribiĝis ĉirkaŭ 30 personoj. Oni lernas tre fervore, kvankam ekzistas grandaj malfacilaĵoj pro manko de tempo ĉe kursanoj. La kurson gvidas s-o Hodakowski.

EL LA GAZETARO.

Variolo disvastiĝas en Anglujo. Fama angla kuracisto epidemiologo Sro Roland Roggers konstatas en Morning Post, ke post la nuligo de la leĝo pri deviga vakcenado kontraŭ la variolo, la malsano terure disvastiĝas en Anglujo. Antaŭ 7 jaroj, kiam la leĝo estis ankoraŭ deviga, la nombro de kazoj de la variolo estis 226 dum la tuta jaro. Depost la nuligo de la leĝo, dum la lasta jaro la nombro kreskis ĝis 15049 kazoj de malsaniĝo je la variolo. Roggers insistas pri la renovigo de la leĝo kiu en najbaraj ŝtatoj estante deviga preskaŭ tute nuligis la malsanon.

En Hindujo disvastiĝas tre grava epidemio de la ĥolero. En Bengalo mortis dum unu semajno 2139 personoj.

Kiel oni ŝparas en Ameriko. Antaŭ la milito la nombro de la posedantoj de valoraj paperoj (akcioj) en Usono estis 4,400.000 personoj, en 1923 tiu-ĉi nombro kreskis ĝis 14,400.000. Dum ses monatoj en 1927 oni emitis en Usono novajn valorpaperojn por la sumo de 4 miliardoj de dolaroj.

La dogana militado inter Germanujo kaj Polujo finiĝis. Oni devas atendi por ambau najbaroj fine normalan ekonomian situacion.

Dank al la pacemaj penadoj de la pola registaro kaj al la ferma volo de la Marŝalo J. Piłsudski, kiu persone interhelpis en la Ligo de Nacioj por la paco, finiĝas post 7 jaroj tute ne komprenebla kaj netole-rebla situacio inter Polujo kaj Litovujo. Ambaŭ nacioj, kiuj tiel longe vivis konkordeme kaj kune kontraŭbatalis komunan malliberecon devas kaj estonte ĉiam konkordeme labori por la komuna paco kaj amo inter ĉiuj popoloj. Tio estas la profetaĵo de nia komuna poeto-bardo Adam Mickiewicz.

Fama angla patologisto Adrian Stokes, kiu mortis antaŭ nelonge en Lagos (Afriko), dum siaj eksperimentoj pri la mikrobo de la flava Febro cedis testamente la sumon de 4.000 funtoj sterl. al sia helpanto dro Geoffrey Rake por plua studado de la patologio.

Krakova Komerca kaj Industria Ĉambro ricevis informon pri la kreo de la Pola Societo de la Transmara Komerco en New York - Astor Court West 34th Street.

Antaŭ nelonge mortis 115 jara Irlanda kamparano Neal Boyle. Estas notinde, ke li dum sia longa vivo nutriĝis je vegetara nutraĵo kaj neniam uzadis alkoholajn trinkaĵojn.

10 de novembro pasis 300 jaroj depost la fama mara batalo ĉe Oliva, kie la pola floto batis kaj disigis la Svedan floton. En 1627 Pola Reĝo Zygmunt III ordonis al la floto sub la gvidado de la Danziga urbano Admiralo Arend Dickman kontraŭbatali multe pli grandan svedan floton.

Admiralo brile plenumis sian devon, preskaŭ neniigante la svedan floton sed, bedaŭrinde, brava homo, dum la batalo estis mortigita. Oni festis solene la memortagon en Warszawa.

PRAKTIKA HELPO AL UEA.

»Ni ne volas, ke UEA pereu, ĉar tiam la movado perdus sian spinon«.

Tiu estis la ideo, kiu ĉefe regis la konversacion de la kunveno de »Fine ĝi venkos«, la Haga sekcio de la nederlanda esperantista federacio, kiam tie estis preparolata la krizo de UEA. Kaj tial ano proponis, ke nia grupo pagu jare sumon de sv. fk. 20— al UEA, kiel helpkotizon, kiu propono estis akceptata.

Cu aliaj grupoj kaj unuigoj, kiuj interesigas pri UEA kaj ĝia laboro ne povas sekvi tiun ekzemplon? Se 250 grupoj same agas, tiam UEA ricevos monsumon de sv. fk. 5000— kaj la krizo estos for.

Ciu grupo metu tiun proponon sur la tagordon de la estonta kunveno. Por tuta grupo tia sumo — aŭ laŭvole pli aŭ malpli — ja ne estas grava, sed por UEA 250-foje tiu sumo estas tre grava. Kiu ion sentas por nia ideo, ne ripozu, antaŭ ol tiu nombro estos atingita.

Ankaŭ unuopaj personoj povos multe helpi al la efektivigado de la propono, kaj tiel helpi al la daŭra ekzisto de UEA: se iu skribas al eksterlandulo (aŭ ankaŭ al samlandano), li ekz. ĉiam aldonu kiel P. S. mallongan frazon, ekz.: »Proponu en via estonta grupkunveno, ke via grupo pagu ĉiujare al UEA helpkotizon, por venki la nunan krizon!« Tiamaniere la propono baldaŭ tramigros la tutan mondon.

Esperanto-gazetoj estas petataj, kopii ĉi tiun artikolon.

Pri la rezultatoj volonte aŭdos la sekr. de la Ned. Esp. Federacio LEEN, sekcio Hago, Nederlando, Theresiastraat 100. Ni aldonu, ke Krakova delegito Sro Wiesenberger kolektis sumon de 89 sv. frankoj. (Red.).

Heroldo N-o 48.

PRZEKLEŃSTWO WIELOJĘZYCZNOŚCI.

Ciążące nad ludzkością przekleństwo wieży Babel, które sprawia, iż człowiek z człowiekiem, choćby był z nim nie wiem jak związany ideowo — nie może się porozumieć — nigdy nie daje się odczuć tak dotkliwie, jak przy okazji wielkich zbiorowisk wielojęzycznych, jakeimi są kongresy międzynarodowe. Przekonaliśmy się o tem dosadnie ostatnio w Sztokholmie, zarówno w niemożności porozumiewania się z wieloma delegatami i miejscową ludnością, jak też w męczarniach wysłuchania każdego, najbliższego nawet, przemówienia w trzech, czy nawet czterech wydaniach (na zebraniach Ligi Kooperatystek prócz dwóch tłumaczeń na języki ofiajalnie uznane, wprowadzono dodatkowo, przez wzgląd na gospodarzy, przekład na język miejscowy).

Proszę sobie wyobrazić, jaka wynika piekielna strata czasu, gdy każdy referat ciągnie się bez końca, a ograniczanie czasu przemówień małe ma w tych warunkach znaczenie praktyczne.

Ponadto sprawa językowa zamyka przeważnie usta delegatom krajów o językach nieoficjalnych, gdyż jeśli nawet taki delegat odczyta z mozołem

swój elaborat w obcym języku — to niema możności brania swobodnego udziału w dyskusji. Był nawet taki dziwny kazus, iż jeden z referentów na konferencji oświatowej musiał prosić innego mówcę, aby odpowiedział na postawione jego referatowi zarzuty. Tymczasem właśnie narody o językach nieoficjalnych zaczynają brać bardzo poważny udział w ruchu spółdzielczym, nawet na kongresach. W Sztokholmie np. wszystkie referaty przypadły małym narodom (Szwajcaria, Szwecja, Finlandja).

By zaradzić złemu, delegacja rosyjska zaproponowała zło spotęgować przez wprowadzenie czwartego języka oficjalnego. W przewidywaniu, iż niebawem znaleźliby się zwolennicy piątego języka i następny Kongres ten wniosek odrzucił, prezydium, zupełnie w tej sprawie bezradne, obiecało w przyszłości sposób wyjścia obmyśleć.

Ale poco chcieć odkrywać Amerykę, gdy takowa jest już dawno odkryta!

Jedynе racjonalne rozwiązanie przynieść może *język międzynarodowy „Esperanto“*, jako język pomocniczy obrad międzynarodowych. Wprawdzie, co do Esperanta, wiele ludzi, zwłaszcza anglików, czuje niechęć, opartą zresztą tylko na nieporozumieniu. Zdaje im się bowiem, iż Esperanto ma na celu wyrugowanie wszystkich języków naturalnych. Jest to oczywiście pogląd błędny i naiwny. Przeciwnie, wszystkie rodzime języki zostają uznane i równouprawnione, a tylko jedno jedyne tłumaczenie dokonywa się na Esperanto. Sposób ten był ostatnio stosowany z dobrym wynikiem na Międzynarodowym Kongresie Nauczycielskim w Pradze. Jest zupełnie możliwe żądanie, aby każdy delegat, zawczasu uprzedzony, nauczył się Esperanta na tyle, by przemówienia esperanckie rozumiał swobodnie.

Prawdopodobnie przykład w tym kierunku da międzynarodowej rodzinie spółdzielczej, nieco ociężałej, jej bardziej ruchliwa, młoda latorośl — Liga Kooperatystek. Właściwie ta ostatnia już przed trzema laty na Konferencji w Gandawie wypowiedziała się za wprowadzeniem Esperanta, ale nie zdążyła jeszcze uchwały tej na tegorocznej konferencji w czyn wprowadzić.

Wydaje mi się, iż właśnie nasz ruch ma tu wdzięczne pole do działania, a to z dwóch względów: po pierwsze, iż jest w tem zainteresowany, jako kraj o języku nieoficjalnym, po wtóre zaś, iż zaszczyt polskiego pochodzenia Esperanta nakłada obowiązki rozpowszechniania go w miarę sił. W niejednej rozmowie z zagranicznymi delegatkami można było wyczuć, iż jakby się tego od nas spodziewają, tem bardziej, iż pierwszy skromny krok w tym kierunku został zrobiony przez wydanie po esperancku streszczenia polskiego sprawozdania na kongres Sztokholmski.

Chodziłoby przede wszystkim, aby powstał u nas zastęp kooperatystów-esperantystów, którzyby ideę Esperanta w międzynarodowych stosunkach szerzyli i drogą korespondowania z kooperatystami zagranicznymi praktycznie ich do tego wciągali.

Trzeba zatem zacząć od tego, by się samemu Esperanta nauczyć! W tym celu należy zgłaszać do kierownictwa Kursów Korespondencyjnych życzenia, aby w najbliższej przyszłości kurs Esperanta w przystosowaniu do potrzeb kooperacji został uruchomiony. Ponieważ, o ile nam wiadomo, projekt taki już poprzednio istniał — napewno szereg zgłoszeń realizację takowego przyspieszy. (Zaznaczamy, iż wystarcza dziesięć lekcji dla opanowania ogólnych zasad Esperanta).

Okazmy się godnymi następcami genialnego naszego rodaka, twórcy Esperanta, Dr. Zamenhofa, a niewątpliwie oddamy tem wielką przysługę sprawie spółdzielczości międzynarodowej, sprawie postępu ogólnego ludzkości.

Dr. Marja Orsetti, (Wspólnota Nr. 41).

B I B L I O G R A F I O.

Zamenhof-Radikaro kun derivajoj kaj fontindikoj. Eugen Wüster. Eldonejo Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig 1927.

La taskon, kiun la aŭtoro volis plenumi per sia verketo, li klarigas mem, dirante, ke ĉi-tiu »Zamenhof-Radikaro« celas prezenti ĉiujn neoficialajn zamenhof-ajn radikojn esperantajn kaj registri iliajn ĉefajn trovlokojn. »Zamenhofaj« estas tiuj radikoj, kiujn prese aŭ skribe uzis aŭ rekomendis la kreinto de Esperanto kaj kiel »neoficialaj« estas konsiderataj de l' aŭtoro tiuj radikoj, kiuj ne estas registritaj en la libro »Wüster, Oficiala Radikaro«, eldonita en Berlino 1923.

La suprecititaj klarigoj de la aŭtoro sufiĉas, por ke la leganto aŭ prefere »studanto« povu imagi la laboron kaj la diligentecon, kiun Wüster kaj lia ĉefhelpanto Sro Paul Kirschke devis dediĉi al tiu verko. Ni diras »studanto«, ĉar la verko estas destinita antaŭ ĉio por tiuj esperantistoj, kiuj ŝatas science esplori kaj science studadi nian lingvon. La »Zamenhof-Radikaro« estas por ĉiu scienca uzanto neelĉerpebla fonto de rimarkindaj konstatoj, kiuj permesas enprofundiĝi en la leĝojn, laŭ kiuj evoluis la genia kreaĵo de Dro Zamenhof. Atentema uzanto de la verko rimarkos, ke multaj radikoj uzitaj de Zamenhof ŝanĝis poste sian formon kaj fariĝis en origina formo arkaikaj. Konsekvence ili havas hodiaŭ nur historian intereson — kiel prave konstatas la aŭtoro.

La sistemo, laŭ kiu la aŭtoro prilaboris sian verkon, estas tiel klara kaj liaj asertoj tiel precizaj kaj ekzaktaj, ke ĉiu scienca uzanto de la »Radikaro« devas admiri lian profundan scion de lingvoscienco ĝenerale kaj de Esperanto speciale.

Nia pure lingvosciencia literaturo ne estas tro riĉa kaj pro tio la aŭtoro meritas specialan dankon, ke li pliriĉigis la tiuspecan verkaron per vera juvelo. Oni devas ankaŭ danki la eldoniston, kiu ne hezitis aperigi fakan, sciencan, sekve »nepopularan« libron. *Napoleono.*

Dr. Antoni Czubyński — Esperantyzm — książka informacyjna. Wydanie drugie. Kalisz, 1927. Nakładem księgarni M. Jasińskiego. Stron 183. Cena zł. 3.

Mało jest ludzi w Polsce, którzyby tak, jak Dr. Czubyński, z zawodu profesor gimnazjalny, a z pracy społecznej — propagator i publicysta esperancki, byli przygotowani do opracowania tej »Książki informacyjnej«. Jest to mała swego rodzaju encyklopedia wiadomości o istocie, historii, obecnym stanie rozpowszechnienia i widokach rozwoju na przyszłość ruchu esperanckiego, w skali ogólnoswiatowej, ze specjalnem uwzględnieniem punktu wyjścia polskiego. W 24 rozdziałach autor zamknął to wszystko, co o sprawie tej wiedzieć należy każdemu, kto o sprawie pomocniczego języka międzynarodowego chce być rzeczowo poinformowany i w niej głos

zabierać. Największe zainteresowanie szerszej publiczności wzbudzić powinny rozdziały: »Propaganda praktyczna przez Powszechny Związek (U. E. A.), »Propaganda parlamentarna i w Lidze Narodów« oraz »Inicjatywa Polskiego Tow. Esper. na terenie międzynarodowym w r. 1920 i następnych«, w której to akcji autor odgrywał sam rolę niepoślednią. Szczegółowy wykaz piśmiennictwa esperanckiego, organizacji oraz ważniejszych postępów Esperanta po wojnie europejskiej również przyczynią się do tego, aby — sceptyków nawrócić, Tomaszów niewierzących przekonać, a sympatyków utrwalić w przekonaniu o żywotności sprawy i zachęcić do czynnego w ruchu udziału. Poważny nader ton książki i głębokość przekonania stanowią dalsze dodatnie jej strony. Aby się nie dać wyprzedzić, trzeba coś robić. Aby coś robić, trzeba coś wiedzieć. Po tę wiedzę o Esperantyzmie trzeba iść do jedynej dziś w handlu księgarskim na ten temat książki Dra A. Czubryńskiego.

J. Z. (Robotnik Nr. 327).

Powstał nowy groźny konkurent Esperanta „Okcidental“, jak powiada niedawno Kurjer Warszawski, a za nim powtarzają inne pisma i pi-semka, mało albo wcale nie uświadomione o tych wymaganiach, jakie stawiamy językowi, który ma chęć, o jak nieraz gwałtowną! zostanie językiem światowym. Autor owego Okcidental, który już dziś na kredyt przyszłej sławy, nazywa siebie najsłynniejszym z żyjących lingwistów i każe obchodzić swe 60-te urodziny, poznamy to sławne nazwisko: p. Edgar de Wahl. Samo wyuczenie się wymawiania samogłosek w tym języku zabiera tyle czasu, ile pochłonie nauka całej gramatyki języka Esperanto. I to ma być naprawdę współzawodnik, »groźny«, którego gramatyka w dodatku, jak mówią przytoczone źródła, nawet nie jest jeszcze gotową! Jaka szkoda, że panowie dziennikarze, którzy objawiają tyle dobrych chęci, ku wyszukaniu języka pomocniczego, nie poświęcą choćby 5 tylko minut czasu na poznanie zasad esperanta. Oszczędziłoby to im przykrych złudzeń na przyszłość, nam zaś niepotrzebnego już dzisiaj otwierania drzwi na oścież otwartych i bezcelowej pisaniny.

B.

La Redaktanto kore dankas ĉiujn, kiuj bonvolis gratuli lin okaze de la 70 jara datreveno, ne tre kontentiga verdire por maljunulo, sed provante, ke eĉ maljunulo povas iomete partopreni en komuna idea laborado. Jes, por la ideo kaj por la idealo ĉiam dolĉe estas vivi kaj labori. Mi ne citas la nomojn, kiujn mi ĝis la fino konservos en la profundo de mia koro.

Al ĉiuj Amikoj de nia gazeto ni sendas koregajn bondeziroj, okaze de venontaj Pacemaj Festotagoj kaj de la Nova Jaro. Ni laboru ĉiuj por nia granda celo de la alproksimigo de ĉiuj Popoloj de la terglobo. Ni nenion detruu, krom la malico kaj la malicemo: ĉiam kaj ĉie konstruu voj, por la bona volo kaj sanaj ideoj. La homaro en si mem enhavas multajn malfeliĉojn. Ne plimultigu ilin!

Por niaj abonantoj ni aldonas kolorajn popolajn eltranĉaĵojn kaj Gvidilon tra Białystok.

ONI ALENDIS AL LA REDAKCIO:

La Progreso, ofic. organo de Ĉeĥoslov. As. esperantista.

Marto, ofic. organo de Germana Ligo en Ĉeĥoslovakujo.

A. I. Z. Laborista ilustrita gazeto germane kaj esperante. Willi Münzenberg Berlin W. Wilhelmstr. 48 IV. Malkosta ilustrita gazeto.

Humoro de l' mondo en esperanto Dro Emil Pfeffer.

Vegetarano, Ofic. organo de la intern. Ligo vegetara esper.

Katolika Mondo organo de Internacio katolika.

La Socialisto organo de Austria Ligo laborista esperantista.

20 Universala Kongreso de Esperanto en Antverpeno petas pri plej frua aliĝo. Redakcio povas peradi kaj laŭeble plifaciligi al la legantaro de Pola Esperantisto. Petu pri aliĝiloj sendante poŝtmarkon por respondo.

Sennaciulo ofic. organo de sennacieca Asocio tutmonda.

La Forta Voko. Dana esper. gazeto.

Bulteno de esperanta presa agentejo Warszawa. S. Essigman.

La Movado. Ofic. organo de la Societo franca. Paris. E. Houbart.

Konkordo. Ofic. organo de la Jugoslavaj esperantistoj. Zagreb.

Germana Esperantisto. Berlin SW. Jeruzalemer str. 46.

Internacia Pedagogia Revuo. M. Goldberg Leipzig S. 3. Frohburger str. 68.

Katalogo de lingvoj. Univ. Esp. Asocio. Genève.

Inter Ni. Organo de interniaro. Livingstone Jenkins London. Nr. 64 St. Thomas Rd.

Austria Esperantisto. Korneuburg ĉe Wien.

Belga Esperantisto. Of. organo de la Belga Ligo esperantista. Antverpeno Franz Schoofs Kl. Hondstraat.

Esperanto Praktiko Berlin SW. 19 Jeruzalemestr. 46.

Heroldo de Esperanto semajna neutrala organo de la Esperanto movado Horrem b. Köln Germanujo.

Esperanto Junularo. Universala instruilo kaj praktikilo. La gazeto de la juna generacio Instruisto. A. Neupert Wedellstr. 17 Leipzig. Por junularo tre rekomendinda.

RESPONDOJ DE LA REDAKCIO.

Sro Inĝeniro M. Chmieliński Nowogródek. Por la eldonajaj aferoj estas hodiaŭ tre malfacila situacio. Eĉ plej gravaj firmaoj ne volonte eldonas literaturaĵojn pro manko da mono kaj pro manko da aĉetantoj. La kostoj de la presado estas multoble pli grandaj ol antaŭ la milito. Ni ne povas konsili al vi fari la tradukojn antaŭ la certigo, ke sukcesos al vi

havi eldonanton. Antaŭ ĉio estas necese, ke la esperanta movado disvastiĝu inter pli monhavaj rondoj, ĉar ĝis nun kiel vi scias, nur tre malmultaj esperantistoj posedas sufiĉe da mono. Nia redakcio faras ĉion eblan por inciti la aferon, sed oni ne povas esti certa, kiom da tempo estos necesa por la rezulto. Se vi havas tempon kaj fervoron por la propagando, disvastigu inter viaj konatuloj esperantan penson kaj agadon, de tempo al tempo sendante por nia gazeto bonajn literaturajn tradukojn.

Sro Wacław Woyde Warszawa. Ni estas tre dankemaj por la sciigoj el la pola gazetaro, kiujn ni ricevas. Kiel vi povas rimarki en hodiaŭa nro de nia gazeto ni korektis la sensencaĵon de la sciigoj pri la fama Okcidental, kiu ne povas esti komparita kun la esperanto. Sufiĉas ke la studado de la vokaloj de Okcidental bezonas multe pli da tempo ol la tuta esperanta gramatiko. Estas tro multaj juĝistoj, kiuj tute ne konas eĉ unu esp. regulon.

Sro Jan Kuzimowicz en Zabłotów. Ni tuj sendos al via dispono la provnumeron kaj volonte uzos viajn rimarkojn, kiuj estas tute pravaj. Ni malfermas de hodiaŭ esperantan angulon por diskutado: bonvolu nur skribi alvokon al volontuloj, kiuj deziras korespondi. Ni havas abonantojn ne nur en Polujo sed ankaŭ en multaj aliaj landoj. Ni presigos laŭ via deziro japanan humorajon.

Sro Jan Zawada. Mi dankas por la alsendo de viaj artikoloj en Robotnik, kiuj estas taŭgegaj kiel instruaj kaj propagandaj por pola publiko. Mi presigos ilin en la proksima nro. Ne forgesu alsendadi sekvontajn.


A. J. Białystok. Viaj poeziaĵoj tre plaĉis al ni kaj sendube ni trovos por ili lokon en nia gazeto. Nur paciencu.

Okaze de la 30 jara medicina jubileo nia Gazeto esprimas bondazi-rojn al Dro W. Róbin sia malavara subtenanto! O. B.

Fabelo: Estis iam viro, kiu pro homamo kreis Esperanton. Nun la homoj amas unu la alian, kaj inter Esperantanoj ĉie regas perfekta harmonio. La eldonistoj de E-libroj kaj gazetoj fariĝis riĉegaj, la kunlaborantoj ricevas grandajn honorariojn, — kaj la aŭtoro de la internacia lingvo mortis kiel miliardulo, ĉar ĉiu Esperantisto ĉiumonate aĉetis minimume unu libron.

Esperanto Praktiko N-o. 11.

Al Radio Aŭdantaro. La redakcio ofte ricevas demandojn, kial niaj polaj sendstacioj ne enkondukis esperanton. Oni devas rimarki, ke ne la Redakcio estas kulpa, sed... tiuj, kiuj ne demandas rekte la Radioestraron. Tro multaj ĉe ni interesiĝas pri lingvo franca, angla k. al., sed ne pri esperanto. Do, petu skribe la Radioestraron.



ADMINISTRACIO

I. GARANTIA FONDO DE »POLA ESPERANTISTO«.

Por Garantia Fondo de P. E. pagis jam:

Prof. Dro Bujwid por X. — 30 zł., por XI. — 30 zł., por XII. — 30 zł.,
Dro Róbin (Warszawa) por IX. — 20 zł. S-ino Neuberg por. X. — 10 zł.,
por XI. — 10 zł. S-ino Rubinstein por XI. — 10 zł. S-o Hoszowski (Bo-
lechów) 2 zł., F-ino Weinsberzanka por IX. — 5 zł., por. X. — 5 zł.

II. GARANTIA ĈENO DE »POLA ESPERANTISTO«.

1. S-o Antoni Wachułka (Jarosław) pagante 2 zł. alvokas S-ojn: St. Dziubiński, Fr. Sredny, Józef Bobiński kaj Eug. Sielski (ĉiuj el Jarosław).
2. S-o Teofil Łabuś (Sosnowiec) pagis 5 zł.
3. S-o J. Szpigler (Będzin) 3 zł.

!!VIVU SEKVONTOJ!!

NE FORGESU RENOVIGI LA ABONON POR J. 1928!

ABONU MEM KAJ VARBU ANKAŬ ABONANTOJN POR LA SOLA
ESPERANTA GAZETO EN POLLANDO!

Kune kun tiu-ĉi numero de »Pola Esperantisto«, ni sendas al ĉiuj
niaj abonantoj senpage, la Kongresan Libreton, eldonitan de la O. K. de
la Internacia Postkongreso Esperantista, Białystok 7—8 VIII. 1927.